

## LA AMATINO DE AMIKO MIA

R. Carlos

Esperantigo: Emanuele Rovere

Ho, kial mi enamiĝis al la amatino de amiko mia?

Kun miloj da inoj en mondo, ĝuste l'amatino de amiko mia.

Ja, estas vere, ke kondukas amo tiel: envizaĝen rigardas ĝi al neniu.

Mi enamiĝis ĝuste al la amatino de amiko mia.

Sed tiajn okulojn belajn dum mia tuta vivo vidis mi neniam.

La mondo grandas sed fariĝas eta, se renkontiĝas vi kun simila virin'.

Nenion diri al li, nek al aliaj, neniam!

Mi ne volas diri al la mondo, ke mi amas l'amatino de amiko mia.

Mi ne volas diri al la mondo, ke mi amas l'amatino de amiko mia.

Kaj kion nun mi faru? Pli bone mi rezignu kaj ne pensu plu.

Se estas mi amiko vera, suferu mi silente kaj ne revu plu.

Ĉar estas vere, ke necesas plori kaj adiaŭi la feliĉon post nun.

Nenion diru al li, nek al aliaj, neniam!

Mi ne volas diri al la mondo, ke mi amas l'amatino de amiko mia.

Mi ne volas, ke la mondo sciu, ke mi amas l'amatino de amiko mia!